MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

2

FEBRUARO 2026 Kol. 486/42

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Popolaj proverboj en Ĉeĥio; La 112-a UK en 2027; PRINTEMPE 2026; Trafikakcidento; Viglaj maljunuloj; Retumadi estas mia granda hobio; Korespond-deziro de Finnlando; Trista informo – K. Čada.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## **Popolaj proverboj en Ĉeĥio -** FEBRUARO

- Se la norda vento en februaro blovi ne volas, en aprilo tion ĝi fari devas.
- Kiam la frosto en februaro forte la naturon trafos, longe ĝi ne daŭros.
- Se la alaŭdo en februaro kantas, tiam kutime granda vintro venas.
- Se februaro ĉasas nubojn, marto konstruas neĝulojn.
- Februara akvo – por kampoj perdo.
- Se februaro blankas – la kampoj pli fortas.
- Multaj nebuloj februare – pluvegoj sekvos tiujare.
- Se fine de februaro la vento blovas, multe da greno la kampoj donas.





# LA 112-A UK EN 2027 OKAZOS EN…

La Estraro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun ĝojo anoncas, ke la 112-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Melburno/Narrm (Melbourne/Narrm), Aŭstralio, de la 1-a ĝis la 8-a de julio 2027. Post la sukcesaj kongresoj en Montrealo (Montréal) 2022, Torino (2023), Aruŝo (Arusha) 2024, Burno (Brno) 2025 kaj Graco (Graz) 2026, la movado denove transpaŝas kontinentojn por festi sian plej gravan jaran renkontiĝon.



UK en Melburno havos apartan signifon: ĝi, post la memorinda kongreso en Adelajdo (Adelaide) en 1997, estos nur la duan fojon en Oceanio. Tiel ĝuste 30 jarojn pli poste la Esperanto-movado revenos al tiu kontinento!

Melburno, ĉefurbo de la subŝtato Viktorio (Victoria), estas moderna kultura centro de Aŭstralio. Ĝi estas konata pro siaj riĉa kultura vivo, vigla multnacieca medio kaj mondfamaj edukaj institucioj, inkluzive de la Universitato de Melburno, kiu estis fondita en la jaro 1835. La urbo mem plurfoje estis nomata la „kultura ĉefurbo de Aŭstralio“ kaj gastigis amason da festivaloj kaj internaciaj eventoj. Ĝi posedas ankaŭ la Unesko-listigitan ekspozician konstruaĵon *Royal*

*Exhibition Building* kun ĝia grandarea urba parko *Carlton Gardens*.

Ĉu ankaŭ vi partoprenos la kongreson? Pro specialaj subvencioj, akiritaj de la lokaj organizantoj kaj la Kongresa Fako, la kongresdato estos iom pli frua ol kutime: la 112-a UK okazos de la 1-a ĝis la 8-a de julio 2027. UEA rezervos ekskluzivan rabatitan kotizon por tiuj partoprenontoj, kiuj ĉeestos la 111-an UK-on en Graco kaj tuj dum ĝi aliĝos al la 112-a UK en Melburno. Tiel oni volas doni pli da oportuno al fidelaj kongresanoj, kiuj ĉeestas sinsekvajn UK-ojn.

La reta aliĝilo por la 112-a UK aperos komence de la 111-a UK en Graco. Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la 111-a UK, ne maltrafu la okazon facile aliĝi per la reta aliĝilo https://uk.esperanto.net

*El la Gazetaraj komunuikoj de UEA*

## PRINTEMPE 2026

Ĉu vi jam planas viajn paskajn tagojn? Ĉu vi ŝatus pasigi ilin dum internacia renkontiĝo kaj ĝui Esperanto-etoson?




PRINTEMPE 2026
invitas vin al la urbo Wiesbaden, ĉe la Rejno-valo, en la koro de Germanio, de ĵaŭdo, la 2-an, ĝis ĵaŭdo, la 9-an de aprilo 2026 (Pasko estos dimanĉe, la 5an de aprilo).

Kial veni? Internacia etoso: renkontu malnovajn kaj novajn geamikojn el multaj landoj! Kulturo kaj amuziĝo: prelegoj, diskutrondoj, ludoj, muziko, konversacio – kaj babilado ĝis la noktomezo! Promenoj kaj ekskursoj gvidos vin tra la urbo mem kaj al apudaj celoj de la bela Rejn-valo. Lernado de Esperanto: kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Konvena loko: la renkontiĝo okazos en la junulargastejo kun komfortaj ĉambroj; la afablaj deĵorantoj de la domo jam gastigis plurajn belajn Esperanto-renkontiĝojn.

**Per viaj demandoj** ne hezitu kontakti nin. Ni ĝoje atendos vin en Wiesbaden!

EsperantoLand e. V.
Louis Ferd. v. Wunsch-Rolshoven
Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus
10551 Berlin
Germanio

Kontakto:
Telefono: +49-30-685 58 31, en Germanio: 030-685 58 31
Poŝtelefono: +49-173-162 90 63, en Germanio: 0173-162 90 63

Jen pliaj informoj:
https://esperanto.land/printempe/#printempe

## Trafikakcidento

Viro kaj virino koliziis en siaj aŭtoj. Ambaŭ aŭtoj estis tute detruitaj, sed neniu vundiĝis.



Post kiam la virino liberiĝis el la aŭto, ŝi konstatis: „Ĉi tio devas esti signo de Dio, ke ni

vivas.“

La viro kapjesis. La virino daŭrigis: „Kvankam mia aŭto estas tute detruita, ĉi tiu botelo da viskio estas tute en ordo. Mi proponas, ke ni trinku kaj festu nian travivon,“ kaj donis la botelon al la viro. La viro kapjesis konsente, malfermis la botelon kaj trinkis duonon de ĝia enhavo. Tuj li redonis la botelon al la virino kaj proponis al ŝi trinki ankaŭ. La virino respondis: „Ne, dankon, mi atendos la policon.“

*-ijk-*

## Viglaj maljunuloj

Sesdekjara paciento Nikl vizitis sian kuraciston por kompleta kontrolo de sia sanstato. Kiam la kuracisto finis, li diris: „Vi estas en tre bona sanstato. Mi trovis nenion malbonan ĉe vi. Vi estos ĉi tie ĝis vi estos centjara. Kiom aĝa estis via patro, kiam li mortis?“



Paciento Nikl: „Mi ne diris, ke li jam mortis.“

„Do, kiom aĝa estas via patro? Ĉu li estas ankoraŭ aktiva?“

„Jes, li estas 83-jara. Li kuras ĉiutage kaj regule dancas.“

La kuracisto demandis surprizite: „Kaj kiom aĝa estis via avo, kiam li mortis?“

S-ro Nikl: „Mi ne diris, ke li mortis.“

„Ĉu vi volas diri al mi, ke vi estas 60-jara kaj viaj patro kaj avo ankoraŭ vivas? Kion faras via avo?“

„Li naĝas dufoje semajne kaj ludas golfon ĉiun dimanĉon. Li estas 107-jara, kaj li reedziĝos venontmonate.“

La kuracisto: „Se li estas tiel maljuna, kial li volas edziĝi?“

Paciento Nikl rigardis en la okulojn de la kuracisto kaj klarigis: „Mi ne diris, ke li volas, – li devas!“

*-ijk-*

## Retumadi estas mia granda hobio

Hobio estas neologisma esprimo, sinonimo de ŝatokupo. Konscie aŭ ne, ĉiuj ni havas hobiojn kaj tio igas nin esti feliĉaj.

Kompreneble, oni ne devas konsideri kiel hobion la laboron, kiun oni faras, plezure aŭ ne, por gajni monon. Hobio estas praktikata simple pro la plezuro, kiun ĝi, dum longa tempo aŭ eĉ por ĉiam, donas al ni.

En Brazilo, kiel ankaŭ tutmonde, ĝardenado, kuirarto, trikado, ludoj, modlado, sporto aŭ kolektado, ĉefe por emerituloj, estas ŝatokupoj.



Tamen la plej agrabla hobio de la brazila popolo estas futbalo. Infanoj, adoleskantoj, adoltoj amas kun pasio la klubajn teamojn, kiujn ili elektis en siaj koroj. Ili kun granda intereso iras al la stadionoj, spektas la matĉojn per televido aŭ aŭskultas la transsendojn pere de radiofonia rakontado. Maltrankvile la favorantoj atendas la oportunan momenton ĝojkrii la magian vorton: «Goooool'!»

Mi, escepte de futbalo kaj politiko, interesiĝas pri multaj

aferoj. Mi ŝatas legi, danci semajnfine, aŭskulti muzikon, promeni tra la plaĝoj kaj plurajn aliajn agrablajn aferojn, sed mi ne konsideras tiujn ĉi esti miaj hobioj.

Retumadi estas mia granda hobio. Delonge, la komputilo fariĝis mia karega amiko. Mi ĉiutage dediĉas mian liberan tempon por studi Esperanton, prilabori tekstojn kaj poemojn, plibeligi fotojn per komputilo.

Resume, mi opinias, ke oni devas ekde la infanaĝo elekti interesajn aferojn, kiel siajn hobiojn, por ĝui agrablajn momentojn de kulturo kaj plezuro dum sia tuta vivo.

*Verkis: Liette Lêla*
*(Reviziis: Célio Freitas Martins)*

## Korespond-deziro de Finnlando

Lempäälä,1. 1. 2026.



Mi ŝatus korespondi kaj amikiĝi kun viroj kaj virinoj en la aĝo ekde 56 ĝis 68 jaroj,
– kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj studas ĝin,
– kiuj povas paroli kaj skribi Esperanton tre bone,
– kiuj instruas Esperanton en lernejoj en sia propra lando.

Mia adreso: Tapani Lappalainen Hauralantie 48, domo 7A, ĉambro 5, 37500 Lempäälä, Finnlando, Eŭropo.
Mia aĝo: 68 jaroj (atingitaj la 11an de decembro 2025)
Miaj ŝatokupoj: aŭskulti muzikon, filatelo, ĉiaspecaj kolektaĵoj: poŝtkartoj, bultenoj, gazetoj, revuoj, lernolibroj, periodaĵoj, Esperantaj materialoj, muzikkasedoj kaj KD-oj, ankaŭ en aliaj fremdaj lingvoj, korespondado kun instruistoj kaj studentoj de

Esperanto, studado (de Esperanto), numismatiko, sporto (ĉefe piedirado, biciklado, nur somere).
Mi esperas, ke vi praktikas kaj studas Esperanton. Mi esperas, ke vi estas viro aŭ virino en aĝo ekde 56 ĝis 68 jaroj. Mi esperas, ke vi instruas Esperanton en lernejo en via propra lando. Mi esperas, ke vi povas paroli Esperanton tre bone, kaj mi esperas, ke vi povas skribi Esperanton tre bone. Mi esperas, ke vi estas instruisto de Esperanto.

## Trista informo



Nia samideano Karel ČADA, 83 jara, multjara ano de AEH, mortis la 14-an de januaro 2026. Honoron al lia memoro!


**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas **AEH** – Asocio de Esperantistoj-handikapuloj en Pardubice, Ĉeĥa Respubliko
**Redaktorinoj:** Mirka KOSNAROVÁ, Ludmila SRBOVÁ
**Adreso:** Svaz zdravotně postižených esperantistů,
Na Okrouhlíku 953/21, CZ 530 03 PARDUBICE
**Telefonnumero:** +420 721 537 970
**Retadreso:** aeh@esperanto-aeh.eu; **retpaĝaro**: www.esperanto-aeh.eu
**La jarabono** de Informilo: **22 €** (en kovertoj), aŭ **11€** (retpoŝte)
**Roční předplatné** Informila: **400,-Kč** (v obálkách), **nebo 200,-Kč** (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše příjmení jako variabilní symbol!
**Příspěvek svazu AEH** v dobrovolné výši.
**Kotizo por AEH** propravola.
**Banka kunligo:** *Fio banka*, konto-numero de AEH: 2801322017, kodo de banko: 2010
**Bankovní spojení:** Fio banka, číslo účtu AEH: 2801322017, kód banky: 2010
**IBAN:** CZ3520100000002801322017, **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX
**Kodo ĉe UEA:** aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.